

# Homaj rajtoj sub premo!

**Tutmonde la homaj rajtoj estas pli kaj pli ignorataj kaj lezataj!**

**Tamen ekzistas kelkaj kaŭzoj por esperi**

**Konsideroj pri la stato de la homaj rajtoj en la jaro 2016**

*Multaj homaj rajtoj, inter alie la liberecoj de opinio, kunveno kaj asociiĝo, tutmonde troviĝas en malfacila situacio. La aktualaj raportoj de gvidaj homrajtaj asocioj konfirmas tiun tendencon. La lukto kontraŭ terorismo, la vaste observata reekflamiĝo de la naciismo kaj religia ekstremismo kreas en multaj ŝtatoj de la mondo klimaton de timo kaj ekskludo, kiu favoras senskrupulan lezadon de homaj rajtoj en ampleksa mezuro. Por reagi al tia evoluo estus dezirinde, se Eŭropa Unio (kiu mem ne posedas komisararon pri homaj rajtoj, aK), fortigus la homrajtajn instituciojn en Eŭropo, ekzemple la Eŭropan Kortumon por Homaj Rajtoj.*

Kiel enkonduke dirite, multaj homrajtaj organizaĵoj unuanime konstatas, ke centraj civitanaj kaj politikaj liberecoj kaj homaj rajtoj, kiuj troviĝas en la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, estas nuntempe grandstile minacataj. Precipe temas pri liberecoj de opinio kaj gazetaro (art. 19), liberecoj de kunvenado kaj asociiĝo (art. 20), rajto je liberaj kaj justaj balotoj (art. 21) kaj la rajto je vivo (t.e. malpermeso de la mortpuno, art. 3).

Laŭ *Amnestio Internacia*, en 2015 la liberecoj de opinio kaj gazetaro estis limigitaj en minimume 113 ŝtatoj (en 2014 estis 119). En pli ol 60 ŝtatoj ekzistas senperfortaj politikaj malliberuloj, do personoj, kiuj troviĝas en la prizono pro tio, ke ili prenis la rajton esprimi sian opinion. Organizaĵoj, kiuj okupiĝas pri liberecoj de opinio kaj gazetaro kiel *Reporteroj sen limoj*, same konstatas tutmonde negativajn tendencojn ĉi-rilate. Laŭ tio, nur 13 procentoj de la homaro vivas en landoj kun libera gazetaro. Ŝtatoj kiel Ruslando, Egiptio, Ĉinio aŭ Turkio timigas ĵurnalistojn kaj jure persekutas ilin, enprizonigas ilin kaj cenzuras iliajn artikolojn.

Alia rimedo por silentigi kritikan ĵurnalismen estas la aĉeto de kritikaj amaskomunikiloj fare de entreprenoj, kiuj staras proksime de la registaro, kiel en Honkongo. Tie la plej grava sendependa gazeto *South China Morning Post* estis aĉetita de la entrepreno Alibaba, kiu havas proksimajn rilatojn kun la registaro en Pekino. Parte, amaskomunikiloj estas rekte konfiskitaj aŭ malpermesitaj kiel en Turkio, kie post la fiaskinta puĉo kontraŭ prezidento Erdoĝan en julio 2015 okazis aparte drasta lezado de bazaj gazetaraj rajtoj. Ankaŭ en Pollando kaj Hungario la registaro klopodas pli severe kontroladi la gazetaron, maldungante kritikemajn kaj enpostenigante politike lojalajn aŭ konformismajn kunlaborantojn en la redakcioj.

Sed ne nur ŝtataj instancoj limigas kaj malhelpas la laboron de ĵurnalistoj. Ekzemple en Meksiko, Honduro kaj Kolumbio ekzistas drogaj bandoj kaj kvazaŭ-armeaj grupoj, kiuj agas kontraŭ la libera gazetaro. En la meksika ŝtato Veracruz malaperis 17 ĵurnalistoj – supozeble ili fariĝis viktimoj de krimaj bandoj.

En la kazo de la pariza ĵurnalo *Charlie Hebdo* estis arabaj teroristoj, kiuj mortigis ĵurnalistojn, redaktorojn kaj kunlaborantojn de tiu redakcio.

Sekve al tia premo, multaj ĵurnalistoj komencis apliki memcenzuron, ĉar ili timas esti mortigitaj.

Ĝuste Eŭropo travivis en la pasintaj dek jaroj la plej grandan malfortiĝon de liberecoj de opinio kaj gazetaro, kvankam tie la homoj daŭre vivas kun plej alta grado de gazetara libereco en la mondo.

## Minacata civilsocio

La liberecoj de opinio kaj gazetaro estas intime ligitadaj kun la rajtoj de kunveno kaj asociiĝo. Tiaj rajtoj formas la fundamenton de aktiva kaj kritika civilsocio. De diktatorecaj ŝtataj reĝimoj kritikaj grupoj de la civila socio ofte estas konsiderataj kiel minaco kaj danĝero, ĉar ili malkaŝas misuzon de politika potenco, korupto kaj lezadon de homaj rajtoj, montras nedeziratajn politikajn alternativojn aŭ pledas por demokratia evoluo de la socio. Multaj registaroj lernas unu de la aliaj kiel oni subpremu la agadon de kritikemaj ĵurnalistoj kaj verkistoj. Ekzemple, oni malpermesas al ili ricevi monon el eksterlando, aŭ oni malhelpas al ili per burokraciaj ĉikanoj. Tiaj tendencoj estas observeblaj precipe en ŝtatoj, kiuj pli frue permesis la aktivecon de sendependaj Neregistaraj Organizaĵoj. *Human Rights Watch* kaj *Carnegie Endowment for International Peace* identigis diversajn landojn, kie specialaj leĝoj estis enkondukitaj por malhelpi, limigi kaj subpremi la agadon de tiaj NROj – temas precipe pri Alĝerio, Angolo, Etiopio, Azerbajĝano, Belorusio, Ĉinio, Eritreo, Jordanio, Kamboĝo, Kasahŝtano, Ruslando, Uzbekistano kaj Unuiĝintaj Arabaj Emiratoj. El la grupo de ŝtatoj, kiujn *Freedom House* identigis kiel duondemokratiajn kaj parte liberajn, menciindas Bangladeŝo, Bolivio, Ekvadoro, Honduro, Indonezio, Kenjo, Nikaragvo, Zimbabvo kaj Venezuelo. Kaj inter la demokratiaj kaj liberaj ŝtatoj tiajn leĝojn enkondukis Hindio, Israelo kaj Peruo. Laŭ kalkulo de la sciencistoj Darin Christensen kaj Jeremy Weinstein de la Stanforda universitato, 50 de 98 esploritaj landoj aŭ malpermesis aŭ limigis eksterlandan financadon de NROj. Al tiu grupo multaj ŝtatoj aldoniĝis nur en la lastaj jaroj. En Hindio, la plej granda demokratio de la mondo, NROj estas kontrolataj kaj malhelpataj de la „Foreign Contribution Regulation Act“ de la jaro 2010. Koncernataj estas precipe homrajtaj kaj mediprotektaj organizaĵoj kiel *Greenpeace*, kiuj kritikeme rilatas al la oficiala registara politiko. Tiun hindian leĝon UNO konsideras nekongrua kun la valida internacia juro.

En Ĉinio, kiu estas la plej granda diktaturo de la mondo, oni volas enkonduki novan leĝon en 2017, laŭ kiu eksterlandaj NROj devas registriĝi ĉe la Ministerio de la publika sekureco, kiu devas kontroli iliajn agadojn kaj financojn. Certaj organizaĵoj, kiuj laŭ la opinio de la registaro minacas la „naciajn interesojn“ aŭ la „unuecon de la lando“, povas esti malpermesitaj. Krom tio, ĉiuj eksterlandaj NROj devas trovi konforman ĉinan partneron. Certe, multaj ĉinaj organizaĵoj timos kunlabori kun certaj eksterlandaj organizaĵoj, kiuj laboras ekzemple sur la kampo de la homaj rajtoj. La nova leĝo koncernos ĉirkaŭ 7000 organizaĵojn, kaj ĝiaj efikoj estos videblaj nur post ĝia enkonduko. La subprema politiko de ŝtatestro Xi Jinping permesos atendi malmultajn bonajn aferojn.

Kiel konate, en Ruslando eksterlandaj NROj, kiuj ricevas monon el eksterlando, de 2012 devas registriĝi kiel „eksterlandaj agentoj“.<sup>1</sup> Tiu leĝo kondukis al tio, ke kelkaj NROj malfondiĝis aŭ forlasis Ruslandon, ĉar ili ne deziras porti la stigmon de „eksterlanda agento“. La unua ruslanda NRO, kiu estis punita, ĉar ĝi ne respektis la regulojn, estis la asocio *Golos*, kiu observas balotojn. En septembro 2016 tiun statuson nun ricevis ankaŭ la signifa sendependa *Levada Centro*, kiu faris gravajn sociologiajn enketojn kaj analizojn.

## Lukto kontraŭ terorismo

Aliaj rimedoj, kiuj povas esti aplikataj por malhelpi NROjn, estas leĝoj pri nacia sekureco kaj lukto kontraŭ terorismo. Tiajn leĝojn konas Ruslando kaj Ĉinio, sed ankaŭ Egiptio kaj Kenjo. Usono estas traktenda kiel aparta kazo.

La prezentitaj kazoj estas ekzemploj por montri, ke la laboro de homrajtaj organizaĵoj estas malpli aprezataj en la mondo kaj ke la homaj rajtoj mem estas malpli respektataj. Laŭ *Freedom*

---

<sup>1</sup> Aktualan liston vd. sub [http://article20.org/ru/node/1569/#.V88VW\\_mLTIW](http://article20.org/ru/node/1569/#.V88VW_mLTIW).

*House*, ĉi-rilataj malprogreso okazis en la lastaj dek jaroj en 105 ŝtatoj, dum la situacio pliboniĝis nur en 61 ŝtatoj. En landoj, kie la civitanaj kaj politikaj rajtoj estas respektataj, tie kutime ekzistas demokratia sistemo, kaj en tiuj ŝtatoj la rajto je liberaj opinio, kunvenado kaj balotoj estas konsiderataj kiel bazaj homrajtoj.

Laŭ la indekso de *Bertelsmann Transformation* la negativaj tendencoj fortiĝis en 129 landoj (kiuj apartenas unuavice al la mondo ekster OECD). Ĝuste en tiuj landoj la demokratio estas konsiderata kiel difektita kaj la aŭtokratiismaj tendencoj kreskas. En 2016, 72 procentoj de 55 ŝtatoj, kiuj estas konsiderataj kiel aŭtokratiismaj aŭ diktatorecaj, estas pritaksitaj kiel aparta drastaj kazoj (en 2014 tio estis 58% de 75 aŭtokratiismaj ŝtatoj). La *indekso pri demokratio* en la unuopaj landoj, publikigita de *The Economist*, povas esti konsultita sub [https://eo.wikipedia.org/wiki/Demokratieca\\_indekso](https://eo.wikipedia.org/wiki/Demokratieca_indekso).

## Mortpuno

Rilate la mortpunon ekzistas kaj pozitivaj kaj negativaj tendencoj. Unuflanke, la plimulto de la ŝtatoj abolis la mortpunon, aliflanke la jaro 2015 signifis novan kulminon de efektivigitaj mortpunoj. En 2015 *Amnestio Internacia* nombris 1634 efektivigitajn mortpunojn, sed la vera nombro estas multe pli alta, ĉar multaj ŝtatoj ne publikigas raportojn pri efektivigo de mortpunoj. Tiel, statistikoj tradicie mankas pri aŭ el Ĉinio, Norda Koreio, Vjetnamio, Sirio kaj Belorusio. Ĉinio estas ŝtato, kiu ekzekutis plej multajn mortpunitojn, kio ofte okazis sekrete – temas pri kelkmil. De la 1600 ekzekutoj, kiuj estas dokumentitaj, 89% okazis en nur tri ŝtatoj, nome Irano, Pakistano kaj Saŭdarabio. Entute okazis sume plej multaj ekzekutoj de mortpunoj de post la jaro 1989. De minimume dek jaroj, 140 ŝtatoj ne plu aplikas la mortpunon, kio povas esti konsiderata kiel progreso. De 2007 la plenkunsido de UN akceptis kvin rezoluciojn, en kiuj la ŝtatoj postulas mondvestan moratorion de la efektivigo de mortpunoj. Pri la plej lasta de tiuj rezolucioj en decembro 2014 voĉdonis 117 ŝtatoj. La plej signifa tendenco en tiu direkto estas observebla en Usono, kie en 2015 ĝis nun 28 personoj estis mortekzekutitaj, kio estas la plej malalta nombro de post 1991, kaj ĝis nun 52 estis mortkondamnitaj, kio estas la plej malalta cifero de post 1977, kiam en Usono oni rekomencis mortekzekuti homojn. 19 usonaj ŝtatoj abolis la mortpunon, kaj nur malmultaj ŝtatoj (nome ses sudaj ŝtatoj) ankoraŭ aplikas la mortpunon. La usona publiko pli kaj pli ofte pledas kontraŭ la mortpuno, eĉ se ankoraŭ 61% de la usonanoj volas konservi ĝin. Kaze ke sub eventuala prezidentino Clinton estos nomumitaj pli da liberalaj juĝistoj por la Supera Kortumo, ekzistos ŝanco, ke la mortpuno estos abolita en tuta Usono. Problemo estas, ke la respublikanoj povas malhelpi nomumon de tiaj juĝistoj. Nuntempe ekzistas kvar liberalaj kaj tri konservemaj juĝistoj, sed pro baldaŭa pensiigo de iuj juĝistoj la ekvilibro povos ŝanĝiĝi.

Koncerne la mortpunon observeblas kontraŭa tendenco en Turkio, kie post la arma puĉo kontraŭ la aŭtokratiisma prezidento Erdoĝan laŭdire aperis pletoj ene de lia partio favore al la reenkonduko de la mortpuno. Ĉu tio estas serioza konsidero aŭ nur emocia propaganda kaprico de la aktuala politika evoluo, ne estas klare, ĉar multaj kritikemaj ĵurnalistoj, kiuj povus raporti pri tiu afero, en Turkio estis eliminataj kaj silentigitaj.

Plej aktuala drasta kazo de lando, kie la registaro plej krude lezas homajn rajtojn, estas Filipinoj. Tie la nova prezidento Duterte, kiu diris, ke li fajfas pri homaj rajtoj, eĉ publike alvokis murdi anojn de drogaj bandoj, kio evidente okazis jam abunde. Laŭ tiu logiko ankaŭ policistoj kaj politikistoj, kiuj estas suspektataj pro partopreno en la droga komerco, estas mortgindaj. Inter la viktimoj de tiaj arbitraj murdoj troviĝas multaj senkulpa homoj. En Davao, kies urbestro Duterte antaŭe estis, estis murditaj pli ol mil etkrimuloj. La kulpuloj, kiuj respondecis pri tiuj murdoj, neniam estis arestitaj kaj prezentitaj antaŭ la tribunalo.

Kvankam plimulto de la homoj de Tajlando ŝajnas apogi la armean ĥunton, la demokratio en tiu lando estas praktike elŝaltita, kun gravaj sekvoj por kritikistoj, kiuj estas senprokraste arestitaj kaj punitaj.

## EU kaj Usono riskas perdi sian kredindecon

Krom la lukto kontraŭ terorismo kaj kreskantaj politika naciismo kaj religia ekstremismo, kiuj kontribuas al la subfosado de la homaj rajtoj, ekzistas alia dimensio: Temas pri la drasta perdo de la morala kredindeco de la ĉefaj protagonistoj de la homaj rajtoj en Eŭropa Unio kaj Usono. Tiu landaro estas okupata pri propraj politikaj problemoj kaj ne ĉiam klare postulas de aliaj landoj kun la necesa firmeco, ke la homaj rajtoj estu respektataj. En tio nova fenomeno estas, ke tiuj „kanajlaj“ ŝtatoj ne hezitas minaci kaj ĉantaĝi la demokratiajn landojn de la mondo, kiuj ofte havas nenium alternativon ol cedi, kio nature multe helpas pluvivigi la reĝimon de la diktatoroj kaj aŭtokratoj, kiuj senskrupule misuzas la demokration por propraj celoj, ofte kun la apogo de vastaj popoltavoloj, kiel imprese montras la ekzemploj de Ruslando kaj Turkio.<sup>2</sup> Precipe en Ruslando moderna demokratia politika kulturo ne ekzistas kaj balotoj en la nomo de la demokratio estas pura farso, same mankas moderna konscio pri homaj kaj civitanaj rajtoj laŭ universalaj normoj. La homoj en Ruslando, kiuj estas politike pasivaj, vivas laŭ aliaj normoj kaj imagoj, kiuj eble estas pli proksimaj al eŭropaj sed tamen esence diferenciĝas kaj de Eŭropo kaj de Azio. Laŭ enketo de la Levada-Centro nur 16% de rusoj deziras okcidenttipan demokration, dum plimulto deziras rehavi la sovetian politikan sistemon.

Ĉi tiu evoluo estas dankinda al la incidento de la 11a de septembro 2001, kiam islamismaj teroristoj atencis kontraŭ la du „ĝemelaj turoj“ de Novjorko, kio kaŭzis ilian detruon kaj milojn da mortviktimoj. Lige kun tiu unika evento en Usono okazadis de tiam konsiderindaj lezoj de homaj rajtoj de personoj, kiuj estas suspektataj pro terorismo. Tiaj personoj devas elteni turmentadon, kidnapadon kaj diversspecan persekutadon ĝis malliberigo kaj planita murdo pere de specialaj rimedoj, ekzemple telestiritaj aviadiloj. Ĉiuj tiuj faroj konsiderinde damaĝis la internacian reputacion de Usono kiel morala instanco kaj entute ege malutilis al la internacia homrajta movado. Homoj, kiuj estas suspektataj pro terorismo, estis kvazaŭ ĵetitaj en la senjuran spacon, en kiu ĉio estas permesata kaj nenio malpermesata. Montriĝis, ke multaj suspektataj personoj estis senkulpaĵ, ekzemple preskaŭ 90% de la prizonuloj en Guantánamo Bay (Kubo), kiujn Usono devis liberigi. Kaj la ŝtatoj de EU ofte eĉ helpis al Usono en ties persekutado de suspektataj personoj.

Ŝajnas, ke la ´klasikaj´ okcidentaj demokratiaj ŝtatoj perdis sian brilon, ĉar ankaŭ diversaj „kanajlaj“ ŝtatoj pli kaj pli fariĝas landoj kun okcidenttipa civilizo, eĉ kun formala demokratia sistemo kaj kapitalisma ekonomio, kvankam la sinteno de la popoloj en Azio al demokratio diferencas de la kutimoj en Eŭropo aŭ Usono. Plej drasta kazo estas la postsovetiaj islamaj ŝtatoj de Centra Azio, kiuj estas regataj de lokaj diktatoroj kaj kie la homaj rajtoj estas grandstile tretataj per piedoj, unuavice por kontraŭbatali terorismen. Bazaj civitanaj liberecoj kaj publika opinia pluralismo ne ekzistas en tiuj landoj, precipe Uzbekio<sup>3</sup> kaj Turkmenio<sup>4</sup>, kaj opoziciuloj estas severe persekutataj, turmentataj kaj en multaj kazoj eĉ fizike neniigitaj en sekretaj prizonoj, kie sidas miloj da homoj. Tiuj landoj, kiuj grandparte estas dezertaj, ankaŭ apartenas al la plej malriĉaj de la mondo, simile al Afriko. En ĉiuj statistikoj de neregistaraj organizaĵoj tiu landogrupa okupas la plej malbonajn poziciojn. Ĉar Usono kaj EU tute ne sukcesis establiĝi en tiuj landoj, la okcidentaj valoroj komplete perdis sian signifon en tiu regiono, kiun Ruslando rekontrolas politike kaj geostrategie, Ĉinio ekonomie.

Alia problemo estas la populareco, kiun pli kaj pli gajnas diversaj naciismaj kaj ekstremismaj partioj kaj movadoj ne nur en Eŭropo kaj Usono, sed ankaŭ en Ruslando, Ĉinio, Hindio kaj Japanio, kiuj difinas kaj aplikas la homajn rajtojn laŭ sia propra maniero, ofte kun perversa efiko. En multaj islamaj ŝtatoj la religio estas konsiderata kiel sola kriterio de la homaj rajtoj, kaj en Eŭropo oni dubas, ke islama terorismo kongruas kun islama religio. Pri la juro de la t.n. „Islama Ŝtato“, kiu brutale furoras en Irako, Sirio kaj Libio, ni tute ne parolu. Tie oni mortigas homojn pro plej malgrandaj malrespektoj de la altrudita ordo. Ke tiuj kriterioj havas nenion komunan kun la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj

<sup>2</sup> Pri la situacio de ĵurnalistoj en Turkio, kie regas stalinismaj kondiĉoj, vd. la ekzemplon de la verkistino Asli Erdoğan sub <http://www.srf.ch/news/international/vergesst-mich-nicht-und-meine-buecher-es-sind-meine-kinder>.

<sup>3</sup> Vd. <http://www.nzz.ch/international/asien-und-pazifik/islam-karimow-usbekistans-despot-ist-tot-ld.114660>.

<sup>4</sup> Vd. <https://www.amnesty.ch/de/laender/europa-zentralasien/usbekistan> kaj <https://www.amnesty.org/en/countries/europe-and-central-asia/turkmenistan>, <http://www.nzz.ch/international/autoritaeres-turkmenistan-612-gefangene-begnadigt-ld.103545>.

estas klare, sed multaj registaroj fajfas pri tiu deklaro. Ekstrema simbolo de rasismo, ksenofobia kaj ofenda sinteno estas la kandidato de la Respublika Partio por la usona prezidenteco, Donald Trump, pri kiu oni povas nur esperi, ke li ne estos elektita. En la pasintaj elektoj al la Eŭropa Parlamento diversaj ekstrema dekstraj kaj eŭropskeptikaj partioj ricevis minimume 19 procentojn de la voĉoj, kio devus esti signalo de alarmo. En multaj ŝtatoj de EU kaj Usono observeblas jena dispartigo de la civitanaro: Dum unu flanko de la civitanoj orientiĝas laŭ la principoj de kosmopolitismo, malfermiteco kaj tutmondiĝo (globalizacio), la alia flanko preferas naciismon, protektismon kaj izoliĝon. En Francio Marine Le Pen parolis pri la abismo inter kosmopolitoj kaj patriotoj, kiuj devus formi la novan skemon anstataŭ la tradicia dikotomio inter dekstro kaj maldekstro. Similan tendencon oni povis observi en Britio lige kun la voĉdono pri ekŝiĝo el Eŭropa Unio. En multaj landoj de okcidenta Eŭropo, kiel en Germanio, Nederlando, Danlando kaj Hispanio, „popolistoj“ nur atendas ĝis kiam la balotantoj amase elektos ilin. Tio povos facile okazi, se la tradiciaj establitaj partioj morale kaj politike bankrotos. Eĉ la scenaro „Hitler“ estas iusence imagebla, ĉar la ksenofobio kaj rasismo en Eŭropo denove kreskas. En la mondo ekzistas multaj (malgrandaj) Hitleroj kaj Stalinoj, kaj en septembro 2016 la Alta Komisararo por Homaj Rajtoj de UN unuafoje kuraĝe menciis kelkajn ekzemplojn de tiaj „demagogoj kaj politikaj fantaziuloj“.<sup>5</sup> La akriĝanta problemo de Eŭropo nomiĝas araboj, islamanoj, afrikanoj, kiuj amase fuĝas de militoj kaj mizero kaj kvazaŭ eksportas siajn problemojn al Eŭropo, kie ili ne estas vere bonvenaj. Diversaj dekstraj populismaj politikistoj kaj partioj eluzas la malkontenton de la frustritaj amasoj kaj gajnas balotojn, kiel la „Alternativo por Germanio“ (AfD). Sed Eŭropo ne povas akcepti ĉiujn mizerulojn de tiu ĉi mondo. Aliflanke, rusoj, ĉinoj kaj aliaj klopodas aĉeti la ekonomion de Eŭropo, la nombro de malhelhaŭtaj civitanoj, kiuj ne ĉiam estas socie integritaj, kreskas, kaj vualitaj islamaj virinoj provokas la malferman, liberalisman sociordon. Ĉiuj tiuj fenomenoj estas veneno por la paco kaj stabileco en Eŭropo, kie la situacio povos eksplodi, se ĝi ne plu estas digestebla, kontrolebla kaj stirebla. Kun tiu evoluo la stato de la homaj rajtoj aŭtomate malboniĝas. Politikaj kvereloj kaj interhomaj konfliktoj jam nun amase okazas. Populismaj politikistoj kaj aŭtokratiismaj regantoj ofte puŝas partikularismon por fortigi la propran legitimecon, kaj ili akre kaj agreseme rifuzas kritikon el Okcidento, kiel imprese montras diversaj ekzemploj kiel Ruslando kaj Ĉinio, Norda Koreio, Kubo, Venezuelo, Irano aŭ arabaj landoj, sed lastatempe ankaŭ Grekio, Hungario, Slovakio, Ĉeĥio kaj Pollando, kiuj pruvigis ĝis nun lojalaj membroŝtatoj de EU, kiuj reagas nerveze kaj malafable, se Bruselo kritikis ilin. Tiel, EU povas disfali antaŭ ol novaj membroj povos aliĝi. Pri tia scenaro la malamikoj de EU nur ĝojos, kvankam ili asertas la malon. Certe, ankaŭ Kroatio kaj Serbio ne estas centprocente fidindaj kaj povas ribeli en ajna momento. En orienta Eŭropo la sentoj pri demokratio kaj homaj rajtoj estas ankoraŭ malfortaj. Kvankam en Ukrainio okazis konsiderinda progreso rilate la demokration kaj liberecon de gazetaro, opinio kaj kunvenado, la situacio de la homaj rajtoj estas malfacila ankaŭ en tiu lando, kiu troviĝas en (nedeklarita) milito kun Ruslando. En liberaj balotoj la malkontentaj popoloj de tiuj landoj povas en ajna momento elekti politikajn ekstremistojn, kiuj kapablas komplete renversi demokration kaj homajn rajtojn. Estas kurioze, ke la aŭtokratoj de tiuj landoj defendas sin kontraŭ la principoj de la demokratio kaj homaj rajtoj, ĉar tiuj evidente minacas ilian regadon. Tiu nova politika ekstremismo enhavas ankaŭ malamon kontraŭ tiuj, kiuj havas aliajn opiniojn kaj ne apartenas al la partioj de la koncernaj aŭtokratiismaj regantoj. Tiuj tendencoj kreas etoson de timo, malamo kaj ekskludo kaj formas idealan bazon por la malrespekto de la homaj rajtoj.

### **Kvar sugestoj por plibonigi la aferojn**

Frédéric Krumbein de *Stiftung Wissenschaft und Politik* en Berlino, kiu liveris la kernon de la informoj en ĉi tiu raporto, kiu estis kompletigita de mi, sugestas kvar rimedojn kun la celo fortigi la homajn rajtojn:

Unue, Eŭropa Unio kaj Germanio prenu rimedojn por kontraŭstari la priskribitajn negativajn tendencojn. Tio signifas, ke EU devas refortigi la propran kredindecon kiel morala instanco rilate la homajn rajtojn. La institucioj de EU devu admoni la ŝtatojn, kiuj lezas la homajn rajtojn, precipe la liberecon de opinio kaj gazetaro. Al tio apartenas la forigo de la rolo de la Eŭropa Kortumo pri homaj

<sup>5</sup> Vd. <http://derstandard.at/2000043920059/Uno-Menschenrechtskommissar-warnt-vorRechtspopulisten>.

rajtoj. EU devus rapide aliĝi al la Eŭropa Homrajta Konvencio por eviti kontraŭdirojn en la interpretado kaj konfliktojn en la aplikado de la homaj rajtoj.

Due, la Eŭropa Ekstera Servo kaj la eŭropaj ministroj pri eksterlandaj aferoj pli forte kongruigu, harmoniigu kaj kunordigu siajn homrajtajn agadojn kaj parolu kun unu voĉo en rilatoj kun ŝtatoj, kiuj lezas homajn rajtojn, ekzemple Ĉinio kaj Ruslando, kiuj sukcesis en la pasinteco krei kontraŭdirojn inter EU-ŝtatoj rilate iliajn komunikaĵojn pri homaj rajtoj.

Trie, EU devus pli forte subteni la homrajtan laboron de UN, ekzemple per havigo de financaj rimedoj, sendo de kompetenta personaro kaj fakuloj kaj instalado de laborgrupoj, kiuj esploras kaj dokumentas la homrajtan situacion en la mondo kaj en unuopaj ŝtatoj kun koncernaj raportoj surbaze de la normoj de la valida internacia juro. En tio Germanio ludu centran rolon.

Kvare, EU pli forte subtenu „evolvo“-landojn kiel Sudkoreion, Tajvanon kaj Tunizion, eble ankaŭ Mjanmaron, kiuj staras sojle de funkcia demokratiaj celas aboli la mortpunon. Tiaj ŝtatoj povus servi kiel pozitivaj modeloj por la koncerna regiono.

\* \* \* \* \*

© Originale verkita en Esperanto de Andreas Künzli, lic. phil., Berno (Svislando) laŭ [https://www.swp-berlin.org/de/publikationen/swp-aktuell-de/swp-aktuell-detail/article/menschenrechte\\_in\\_bedaengnis.html](https://www.swp-berlin.org/de/publikationen/swp-aktuell-de/swp-aktuell-detail/article/menschenrechte_in_bedaengnis.html) kaj publikigita sur [www.planlingvoj.ch](http://www.planlingvoj.ch) en septembro 2016. La aŭtoro studis slavstikon, orienteŭropan historion kaj internacian juron en la universitato de Zuriko.

Detalan studon pri la stato de la homaj rajtoj en unuopaj ŝtatoj de la mondo en 2014/15 vd. sub [http://www.planlingvoj.ch/Homaj\\_rajtoj\\_2014-15.pdf](http://www.planlingvoj.ch/Homaj_rajtoj_2014-15.pdf)